

Si vidas lian ruĝan buŝon kaj liajn flamajn, nigrajn okulojn. "Bonan vesperon, fraŭlino" li ridante diras. "Ĝis venontjare eble. Esperu ni ke la vinberoj sukcesos".

Jaro daŭras tiel longtempe, ŝi pensas melankolie. "Nu" ŝi postvokas lin: "Kiam la vinberoj estas maturaj, vi ricevos la plej belan vineraron".

Kaj tiam ŝi staras sola en la ĝardeno. Ŝvebas bonaodoro de tero. Vespere elgrundiĝas. Ĉie silento. La firmamento malhelbluas kaj venas granda soleco en ŝi. Kial Martinus ne estas ŝia frato? Ŝi eĉ pensas pri pli... sed fermetas la okulojn. Ne, ne tio! Sango venas al la kapo. Ŝi jam vidas la najbarojn frapi sur potoj, kovriloj kaj marmitoj. "Kaj se tamen mi volus" ŝi flustras en sento ribelena. Je tiu momento la sonorileto tintas, zuma kaj laŭta, tra ŝia koro. Kaj ŝi preĝas surgenu la "Anĝelo de Nia Sinjoro".

Kiam ŝi restaras la luno kun la arĝentaj figuroj ŝajnas plektita en la maldensa pomujeto. Ŝi timiĝas kaj demandas: "Ho! ĉu hodiaŭ ni ne faris malbonon?".

WŠWŠWŠWŠWŠWŠWŠW

B/ poezio: ni publikigas hodiaŭ poemon de la flandra batalanto Berten Rodenbach kiu bedaŭrinde tre june mortis.

S N E Y S S E N S .

(La poemo priskribas la heroo morto de Genta flagportisto dum la batalo de la Gentanoj kontraŭ Filipino la Bona en 1452).

Abomenaĵ'! En la flava lum' de l'nigra okcidento
kaj sub nebulo plena la ĉielo
kuras senespere for amas' kaj postkurego;
Kriado, venkokri' kaj bru' de l'ŝtalo
eksilentigas plendon de l'rompitaĵ vundegitoj,
en kiuj la rajdistoj tranĉadas.
Gent' estas, lasta liberecespero forkuranta!
Skuegas mano l'Gentan leon-flagon,
kriegas voĉo tra la bruo: "Helpu la urbanojn,
l'edzinojn kaj infanojn ree vidi!"
Gent'! Kiuj helpas, tien ĉi! Gent'! Gent'!" Disigis ilin
muelej', giganta spektro en krepusk'.
Ondiĝas ili ambaŭflanken. Rajdistar' kuregas.
Freneze eksaltas ili sur la lancojn.
Ĉevaloj falas. Saltanta estas l'aro. Pligraviĝas
batalo ĉe la muelejrempar'.
Ekscitas kontraŭstaro la venkeman rajdistaron.
Per fulm' de l'zuma glavo ĉirkaŭata
tutpova kontraŭstaras fortoplene flagportist'
kaj hakas la rajdistojn, la ĉevalojn
teren. Kadavroj amasiĝas kontraŭ la hero',
sed kuragegon rompas superforto,
Kaj sur kadavra sang-rempar' li staras dum krepusko,
tutsole l'flagportist' en glava fulm'.
"Vin kapti lasu!" sonas "Gent'!" Rajdiston fendas li.
Sur lin ekhajlas glavoj. "Kapti lasu!"
"Gent'!" La fulmo tranĉas tra la kask' de tri rajdistoj.
Galopforiĝas l'atakantoj. Treme
li skuas sian manon; ĝi ekfalas; sango spruĉas
sed lia brak' ŝiriten flagon premas.
"Vin donu!" sonas. "Gent'!" li krias, ŝancelante staras
en sanga la fulmad' de sia glav',
terure bela. Nova ŝtorm' sur lin hajligas glavojn,
sed ekvundite malantaŭensaltas.
"Vin donu!" - "Gent'!" li ĝemas kaj penege ekstarante
li vundas rajdiston per la flagopint'...
kaj li ekmortas; konvulsie l'disŝiraĵojn premante,
sopiras "Gent'!" sangvomas kaj mortas brave. Tremante ja,
la glavoj teren, mutaj nun, admiras lin rajdistoj.
Forkuras l'aro en la malproksimo.
Ho! Kynegyros, enviploru, al Sneyssens jetu l'kronon!

(Trad. : Armand Somerling)